# Trejnilo de Esperanta Leksiko

Kompilo kaj metodika prilaboro: Ryszard Rokicki

## TESTO 24

**Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.
1. Al vi ne plaĉis sitelo, laboru per m ␣ ␣ t ␣ ␣ ␣.
2. Minaci per p ␣ g ␣ ␣ en la poŝo.
3. Pli kara estas kapo ol ␣ ␣ p ␣.
4. La ŝipo kuris super la ondoj, unu velo post la alia estis levataj, pli forte batis la ondoj, nigra nubego sin montris kaj ␣ ␣ l ␣ ␣ ␣ malproksimaj ekbrilis.
5. La entrepreno akuzas la artistojn, ke ili deliktis kontraŭ f ␣ ␣ k ␣ da leĝoj: pri aŭtoraj rajtoj, pri konkurado kaj pri varaj simboloj.
6. Pro la frua alveno de la printempo, afidoj fojfoje ekatakas junan ␣ r ␣ t ␣ k ␣ ␣. eĉ antaŭ ĝia florado.
7. La lasta etaĝo de la ŝtuparo estis kovrita per ␣ ␣ p ␣ ŝ ␣ ␣ kaj de supre lumis al ni malgranda lampo.
8. Ĉiu unuopa tago nombras 86 400 sekundojn (24 horoj x 60 minutoj x 60 sekundoj), pro tio oni ␣ ␣ f ␣ ␣ ␣ ␣ la sekundon kiel 86 400-onon de unu suntago.
9. Dum ekstere varmas, igvano ŝatas surgrimpi arbojn aŭ ␣ r ␣ ␣ d ␣ fragojn en la ĝardeno.
10. Lastatempe la Päätalo-Instituto ␣ t ␣ ␣ d ␣ ␣ sian agadon ankaŭ al Ruslando kaj Svedio por kultivi la finnan lingvon tie.

**Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.
1. Toproduktado de elektra e ␣ ␣ ␣ g ␣ ␣ gvidas la ŝtatorganojn al evidenta neglektado de energiŝparado kaj al nesubteno de renoviĝantaj energifontoj.
2. La koktelon ***Daiquirí*** oni pretigas ĉefe per blanka rumo kaj c ␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ suko.
3. Klaĉoj asertas ke Marta havas la nazon kaj m ␣ n ␣ ␣ n ␣ ␣ de sia patrino kaj la lipojn kaj okulojn de sia patro.
4. Por kontentigi la avidon je profitoj, en multaj fabrikoj oni maldungis laboristojn, ĉar s ␣ l ␣ ␣ r ␣ ␣ kostas, kaj anstataŭis ilin per robotoj.
5. En mia propra lando Aŭstralio ni bezonis pli ol 100 jarojn, antaŭ ol ni sukcesis fine abolicii la fifaman blankan aŭstralian enmigradan p ␣ l ␣ ␣ ␣ k ␣ ␣.
6. En 1998 la Komisiono pri la Sveda Lingvo komisiite de la registaro, p ␣ ␣ z ␣ ␣ t ␣ ␣ planon pri tio kiel apogi la svedan lingvon en Svedio.
7. Post la vespermanĝo la organizantoj s ␣ r ␣ r ␣ ␣ ␣ ␣ ĉiujn per kvar lokaj muzikistoj, kiujn ili invitis por dancigi la homojn per diversaj folkloraj kaj tradiciaj popolmuzikoj.
8. Cetere la oficialaj donitaĵoj, kiujn k ␣ m ␣ ␣ ␣ k ␣ ␣ la landaj aŭtoritatoj, malkaŝas la fakton, ke verŝajne la skalo de moderna sklaveco estas multe pli granda.
9. Eŭropanoj ŝategas ĝui komfortojn provizitajn de senbremsa tutmondiĝo, sed hipokrite kulpigas la fremdulojn pri ĝiaj d ␣ m ␣ ĝ ␣ ␣ (senlaboreco, necerteco, malsanasekuro, ktp).
10. Surbaze de la vortprovizo en la libro oni povas e ␣ z ␣ r ␣ ␣ bazan parolkapablon, kiun plua lernado povos nur perfektigi kaj stilriĉigi.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| |
|---|
| bank', kurb', solid', supoz', meti', kongres', parti', sabl', centr', organ'. |

1. Tie ĉi mi trovis komforton, prudentecon, guston kaj modestan lukson ĉe simpla ␣ ␣ t ␣ ␣ ␣ t ␣, kiu komprenis vivi kun malgrandaj elspezoj.

2. La ribosomoj estas etaj enĉelaj ␣ ␣ ␣ ␣ n ␣ t ␣ ␣, kie troviĝas la ribosoma ribonukleata acido (rRNA) kaj proteino.
3. Ekde 1408 Hus kaj liaj ␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ n ␣ ␣ havis ĉiam pli oftajn konfliktojn kun la ideaj kontraŭuloj.
4. Pro troa fiŝkaptado, ŝarkoj nun devas ĉasi sian naturan predon ĉiam pli proksime al la tero, ĉefe inter ␣ ␣ b ␣ ␣ ĵ ␣ ␣ konfuzante ofte surfanton aŭ plonĝanton kun foko aŭ otario.
5. Ekzistas laborprojekto por purigado de la Havana marhaveno, laŭplane, dum la unuaj kvin jaroj de tiu ĉi projekto oni laboros por elimini ␣ ␣ l ␣ ␣ ␣ ĵ ␣ ␣ ␣ kaj hidrokarbonojn.
6. Fojfoje, se ĉiun duan paŝon alparolas min homo, tio estas problemo, kiam urĝe mi devas trakuri ␣ ␣ ␣ g ␣ ␣ ␣ ␣ j ␣ ␣ por akurate trafi iun kunvenon.
7. Frederiko decidis montri al ni ĉiujn ĉambrojn de la misiejo, al kiuj apartenis ankaŭ la komputila ␣ ␣ n ␣ ␣ ␣ j ␣ kun la efektive tute nova komputilego.
8. Kapitalistoj respondecas pri la morto de milionoj da personoj tra la mondo, ekz. en Afriko, kie ␣ ␣ ␣ k ␣ ␣ t ␣ ␣ finance apogas koruptajn registarojn kaj eĉ ŝtat-renversojn.
9. En DNA, adenino ligiĝas al timino, kaj guanino ligiĝas al citosino, rezulte de tiuj ligoj, la du ĉenoj k ␣ ␣ b ␣ ĝ ␣ ␣, ĉiu ĉirkaŭ la alia kaj la rezulto estas la bone konata duobla helico.
10. ***Favolosa*** estas nova, olivarba specio, kiu ␣ ␣ p ␣ ␣ ␣ g ␣ ␣ grandan estontecan rendimenton: oni fakte povos produkti mezume eĉ 12 tunojn da olivoj en ĉiu hektaro.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

1. La akvujo de normala fajroestinga veturilo de la viena fajrobrigado entenas nur 1000 ___ da akvo, kaj tial la ŝprucado finiĝas post nur tridek sekundoj.
   a. violojn b. litrojn c. kavojn d. frostojn
2. Oni eĉ ne povas indiki la ĝustan jaron, kiam unue aperis ___ kaj pri ilia inventinto oni plu diskutas.
   a. hirundoj b. etaĝoj c. alumetoj d. gorĝoj
3. Je la sekvanta mateno la ŝipo ennaĝis en la ___ de la belega ĉefurbo de la najbara reĝlando.
   a. havenon b. pladon c. verso d. hotelon
4. La glacio puŝiĝis antaŭen fosante la molan ___, dismuelante kaj ŝlifante la bazan rokon.
   a. grundon b. vermon c. aventuron d. karakteron
5. Mi ne povas ja ami tiun ĉi grandegan, teruran ___, por kiu mi sentas estimon kaj timon!
   a. bienon b. pipon c. leonon d. balonon
6. La paleontologio konas cetere pliajn prahistoriajn varanojn (eĉ specion de 5 ___ en Aŭstralio) kaj havas nun sufiĉe klaran bildon pri ilia genealogio.
   a. placoj b. komitatoj c. aparatoj d. metroj
7. Ĉiu sin submetas al Usona horo, muziko, filmoj, konsumada kulturo kaj ___ ne pensadi ekster mono.
   a. banko b. kremo c. sekundo d. modo
8. Aldone la partoprenantoj ankaŭ ludis simulludon, kies celo estas praktiki toleremon kaj demokration, kaj ___ al ekologia kaj civitanrajta organizoj en Varna.
   a. ĝemis b. supozis c. ekskursis d. toleris
9. Dum la Esperanta Arta Vespero en la Kulturdomo de Staszów (Pollando) funkciis ankaŭ pentroarta kaj ___ ekspozicio de Ilona Ejsmont.
   a. fotografia b. acida c. lama d. scivola
10. Mi estas virino nesperta, mi ĝis nun eble tro malmulte atentis la interhomajn rilatojn, la ordon de la aferoj, kiuj ne ___ min persone.
   a. razis b. babilis c. skulptis d. koncernis